# EKO 2024

TRA LA MONDO IRAS FORTA VOKO

**Numero 2024:27; julio 08.**

Pezo: Word 40, PDF 200 KB, Alkroĉaĵo: Afriko 1224 KB. Sume 1464 KB


## Grandioza rekono de sukcesa Eo-agado

Zsófia Kóródy ricevis pro pli ol dudekjara multflanka elstara laborado por resp. per la neŭtrala paclingvo Esperanto en Herzberg am Harz -- la Esperanto-urbo -- la renoman premion de la Federacia Prezidento s-ro Steinmeier. Tio estas grava paŝo antaŭen por la socia, politika kaj administracia agnosko de Esperanto.

Dum la lastaj jaroj nia ŝtato reduktis la disdonkvanton de tiu elstara ordeno, nome nur por personoj kun multjaraj sukcesoj -- unuavice komunutilaj laboradoj.

La festo okazis la 19-an de junio en la kunsidsalono de la urbodomo de Herzberg am Harz. La ĉefo de nia distrikto Göttingen laŭtlegis la laŭd-deklaron. Sinjoro Riethig aparte menciis la interkulturajn sukcesojn rilate al Esperanto en nia urbo kaj regiono.




La urbestro Christopher Wagner, ĉeestantaj politikistoj kaj Esperanto-geamikoj elkore gratulis al Zsófia Kóródy kaj dankis pro la multjara konstanta laborado, pro la aktiva engaĝiĝo por la neŭtrala paclingvo Esperanto kaj por Herzberg.

Intertempe Herzberg am Harz kun la aktiva Esperanto-Centro atingis grandajn sukcesojn. Tie ekestis unu el la plej grandaj Esperanto-kolektaĵoj kun larĝskalaj Esperanto-fakarkivoj. Okazas en la muzeo de la Welf-kastelo konstantaj Esperanto-ekspozicioj kaj troviĝas ampleksa Eo-sekcio ankaŭ en la urba biblioteko. La Esperanto-Centro en Herzberg laboradas kiel multkompetenta Esperanto-instituto, ekzemple por kulturo, klerigado kaj informado. Regule ni flegas kontaktojn kun politikistoj, la urba administracio kaj lokaj asocioj.

Zsófia Kóródy estis kortuŝita kaj dankas al ĉiuj kunstrebantoj, subtenantoj, geamikoj kaj volonte daŭrigos la Esperanto-laborojn.

## Sumoo-stila luktado kontraŭ legendaj paĝoj

La 14-an de julio komenciĝos la 88-a Internacia Esperanto-Sumoo. Mi atendas vian aliĝon. Dum du semajnoj ni, la partoprenantoj, ĉiun tagon legas la libron, kiun ni elektas, kaj kvanton da paĝoj, kiun ni mem decidas, kun 300 esperantistoj tra la mondo. En la solidara sento ni povas ĝui legadon de Esperanto-libroj. Tiu sumoo

estas la plej granda leg-movado en la homa historio, danke al Esperanto kaj interreto. Mi atendas vian aliĝon. Vizitu nian retejon: http://www.esperanto-sumoo.pl/

**HORI Jasuo**, Retadreso: hori-zonto@r.water.sannet.ne.jp

## Juliaj jubileoj

Alfred Michaux, Miyamoto Masao, Sándor Szathmári, Eŭgeno Lanti kaj aliaj eminentaj esperantistoj estas en la listo de Esperantaj jubileoj kaj memordatoj por julio, kompilita de Aleksander Korĵenkov por *La Ondo de Esperanto.* En julio okazos ankaŭ la 137-jariĝo de Esperanto kaj la 50-jariĝo de la 59-a UK en Hamburgo. Legu la liston en *La Ondo de Esperanto* https://sezonoj.ru/2024/07/julio-10/

## Ekzamenhofe pluen!

Fine de junio la KER-Ekzamena Centro de UEA organizis retajn ekzamenojn je la niveloj B1, B2 kaj C1. Al la ekzamenoj aliĝis 69 personoj el 19 landoj, ekzameniĝis 56 kandidatoj kaj sukcesis 53.

Katalin Kovats, la estro de la KER-Ekzamena Centro de UEA. resumis la ĉefajn sciindaĵojn pri la retaj ekzamenoj, publikigas statistikaĵojn, listojn de la sukcesintoj, helpintoj kaj de la sponsoroj de la ekzamen-periodo.

**Legu la detalojn en la anonco.** https://edukado.net/novajhoj?id=906

## Hispana perdo

Mi bedaŭras informi pri la forpaso de Luis Hernández García, veterana esperantisto el Valadolido (Hispanio), la 29-an de junio, en la aĝo de 85 jaroj. Li estis esperantisto de 1962, motoro de la iama grupo en Valadolido (*Valladolid*, en Kastilio), dumviva membro de UEA, sekretario de HEF kaj respondeculo de ties libroservo dum multaj jaroj. Li krome prizorgis grandan librokolekton. Modesta homo, tre afabla, li estis la edzo de Rafaela Urueña, honora membro de UEA, kiun multaj el vi certe konas. Kondolencoj al liaj multaj amikoj kaj speciale al Rafaela.

José Antonio del Barrio http://www.delbarrio.eu

## La Zagreba Metodo atingas Tanzanion

Kroata Esperanto-Ligo publikigis en Tanzanio novan lernolibron de Esperanto laŭ la Zagreba Metodo en la svahila lingvo. La lernilon adaptis al la svahila burundano Eric Nsabiyumva. La svahila estas parolata de ĉ. 100 milionoj da homoj en orienta Afriko en 12 landoj. La libro estis presita en Aruŝa, la kongresurbo de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu la unuan fojon okazas en Afriko.
Tridek unuaj ekzempleroj estos senpage distribuita dum la Movada Foiro en Aruŝa. Postkongrese ĝi estos havebla ĉe Kroata Esperanto-Ligo kontraŭ € 10, plus sendokostoj. Tio estas la 22-a presita lernilo lanĉita de Zlatko Tišljar kaj liaj kunlaborantoj en 1978. En multaj pliaj lingvoj ĝi konsulteblas ĉe www.Esperant12.net

Spomenka Štimec

## Konata serio nun kun grava azia lingvo



Ĉi-semajne aperis la ***Angla-Esperanta-Ĉina etvortaro pri Homa vivo kaj Loĝado***. Temas pri la aktualigita kaj ĉinigita versio de la Angla-Esperanta-Hungara etvortaro de Ilona Koutny. Du studentoj el la magistra interlingvistika grupo, LONG Yunxia (Nuba) kaj SUN Yesheng (Suno) pretigis la ĉinan version, kontrolis ĝin GONG Xiaofeng (Arko). En la libreto troviĝas ankaŭ ekzercoj por uzi la vortaron en progresanta nivelo (Esperanto). Jen foto de la kursfininaj studentoj en ĉina restoracio en Poznano.

Ilona Koutny

## Japanio kreis retejon por la Esperanto-tago

Ni faris la retejon de JEI pri la Esperanto-Tago 2024 jene.

UEA / エスペラントの日 2024年7月26日
https://www.jei.or.jp/eo-tago-2024/

Mi deziras, ke tio estu la japana maniero konigi la aferon al neesperantistoj.

Hirojuki Jokohamo

## Madagaskaro disradias informojn

Jen la ELSENDO 143 de Aminda Radio Esperanto produktita de esperantistoj el Malagasio. La unua rubriko de nia podkasto proponas al vi kelkajn novaĵojn de la kuranta monato kaj nia amikino Navalona kunprezentas ĝin kun mi. Estas la unua fojo, ke ŝi partoprenas en tiu ĉi elsendo. La dua rubriko temas pri la ĉefurba kvartalo Andavamamba, kien turistoj ne kutimas aliri pro diversaj kialoj. Ni re rendevuas kun vi nur en septembro pro teknikaj kialoj. Agrablan aŭskultadon al vi ĉiuj!

**https://youtu.be/0iD2cUweHTQ**

## Survoje al inda laborplano

Renato Corsetti aperigis en *La Ondo de Esperanto* sian artikolon 'Labor-plano, planoj kaj laboroj', en kiu li prezentas siajn ideojn responde kaj kompletige al la unupaĝa malneto de la laborplano de UEA, verkita de la prezidanto de UEA Duncan Charters. Legu kaj komentu (necesas registriĝi) la artikolon de Corsetti ĉe https://sezonoj.ru/2024/06/corsetti-4/

## Nova libro-eldono en Hungario

Kiel donacon por la Semajno de la Libro akceptu la ĵus aperintan, Esperantan tradukon de la libro *Ŝercoj de reĝo Matiaso* kompilita de Ernő Szép kun la ilustraĵoj de Sándor Kolozsvári. La libro elŝuteblas en PDF-formo ĉe la sekva ligo:

http://verkoj.com/tradukistoj/jozefo-horvath/

Jozefo Horvath, www.vortaro.hu

## <Landa parad’> pri Afriko alkroĉita

Via EKO-redaktoro aparte laboris por pretigi la resumon de landa agado en Afriko antaŭ la Universala Kongreso en Aruŝa. Ni alkroĉas la sveltigitan version de la dokumento.

## Aliĝoj al Aruŝa ege progresas

En la 5-a de julio aliĝoj por la UK en Aruŝa kreskis ĝis 767 personoj el 64 landoj: Tanzanio 142, Burundo 73, Kongo DR 67, Germanio 49, Francio 49, Italio 30, Japanio 30, Koreio 27, Ĉinio 26, Usono 25, Pollando 21, Brazilo 21, Belgio 17, Britio 14 kaj Hispanio 13.

Tio estas pli ol la aliĝoj al pluraj UK tra la historio: la unua en 1905 Bulonjo-sur-maro (688), 1910 Vaŝingtono (357), 1915 Sanfrancisko (163), 1939 Bern (765), 2014 Buenos Aires (706).

***SMG:*** Evidente, ne ĉiuj el tiuj personoj fizike partoprenos; temas pri subtenaj aliĝoj, sed ankaŭ tio estas inspira!

========= vortoj: 1150 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

**Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj**

**Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj**

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**La unuaj dudek numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apertenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.